



## Hosianna Davids son

*G. J. Vogler.*

Ho - si - an - na, Da - vids son! Vål -

sig - nad va - re han, Vål - sig - nad, Da - vids

**H**osianna, la filo de Davido estas adventa kanto kaj himno, origine komponita por miksita koruso kaj orgeno ĉirkaŭ 1795 fare de Vogler. Ĝi estas unu el la plej kantataj Adventkantoj de Svedio.

Vogler prezentis sian verkon en la preĝejo de Sankta Klara en Stokholmo en 1796.

Matt 21:9

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,  
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

"Nur" kaj "sed"	123
La tago de reformacio – prediko	129
Dank' al Dio	132
For la batalilojn	134
Parolado de Václav Havel*	136
Kristnaska arbo	138
Mia eta filozofio	140
Informetoj – aliĝiloj kaj IRDE 10	141
Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno	142
Evangeli'	144

## Redaktoraj vortoj

**K**ara leganto, jam estas la lasta numero de la jaro 2021. Dum la somero kaj aŭtuno ni sopiris kaj spiris la liberecon for de la pandemia jugo. Sed, tiu sed, ni nun denove vidas la kreskantan nombron de kontaĝitaj homoj en multaj landoj kaj la registaroj denove devas starigi limigojn. Ploriga situacio. Verŝajne ni ne povos reiri al antaŭ-pandemia viv-situacio.

Tamen, ni ne tute malesperu, ĉar en la malheleco ni ankaŭ nun vidas helecon – estas ja la Adventa tempo – kaj ni povos denove aŭskulti la Evangelion, ke nia savanto naskiĝis.

Espereble vi ofte praktikas nian internacian lingvon Esperanto, legante librojn, gazetojn, vidante la interretajn diservojn (IRDE) aŭ simile. En tiu ĉi numero vi trovas kelkajn legindajn artikolojn kaj ligojn/proponojn al aliaj. Se vi legas ion interesan, mi volonte publikigos vian recenzon en Dia Regno.

Mi deziras al vi ĝojplenajn kristnaskajn festotagojn.

# “Nur” kaj “sed”

József Farkas hungara protestanta pastoro en  
biblia rondo la 27an de junio 1991, Budapest

Redaktis kaj tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

**P**ri ekstraordinare grava evento informas nin la skribanto, pri unu el la plej signifoplenaj okazaĵoj de la historio de la unua eklezio. En la vivo de la unuaj komunumoj ĝi estis tre decidiga punkto, tre ekscita kunveno, kiun oni

kutimas nomi kiel apostola sinodo, la unua kristana sinodo. Pri tio temas tiu ĉi teksto.

Ni legas, ke venis kelkaj homoj de Judajo, en la hungara traduko estas pli precize: kelkaj subvenis de Judajo, ĉar

Venis kelkaj homoj de Judajo, kiuj instruis al la fratoj: Se vi ne lasas vin cirkumcidi laŭ la kutimo de Moseo, vi ne povos saviĝi. Paŭlo kaj Barnabas implikiĝis en ne malgrandan tumulton kaj kverelon kun ili; tial oni aranĝis, ke Paŭlo, Barnabas kaj kelkaj tieuloj iru al Jerusalemon por konsulti la apostolojn kaj pliaĝulojn en Jerusalemo pri tiu demando. La eklezio elakompanis ilin, kaj ili vojaĝis tra Fenikio kaj Samario, kie ili faris grandan ĝojon al la gefratoj, raportante pri la konvertiĝo de la gojoj. Alveninte en Jerusalemon, ili estis akceptitaj de la eklezio kaj la apostoloj kaj la pliaĝuloj, kaj rakontis ĉion, kion Dio faris al ili. Kelkaj el fiduloj, el la farisea partio, ekstaris kaj diris: Estas necese cirkumcidi ilin kaj instrui, ke ili observu la Toraon de Moseo.

Kunsidis la apostoloj kaj la pliaĝuloj por detale rigardi la aferon. Kiam fariĝis granda kverelo, leviĝis Petro kaj diris al ili: Fratoj, vi scias, ke antaŭ longe el inter vi elektis min Dio, por ke per mia buŝo la gojoj aŭskultu la bonan mesaĝon kaj venu al la fido. Nu, Dio, la koro-scianto, atestis pri ili, Li donis al ili la sanktan spiriton same kiel ankaŭ al ni, kaj Li faris nenian diferencon inter ni kaj ili, puriginte per la fido iliajn korojn. Kiel do nun vi defias Dion, dezirante meti jugon sur la nukon de lernantoj, kiun nek niaj patroj nek ni mem

kapablis porti? Estas per la graco de Sinjoro Jesuo, ke ni fidas saviĝi, samkiel ankaŭ ili. La tuta amaso silentiĝis, kaj ili aŭskultis Barnabason kaj Paŭlon rakonti pri ĉiuj signoj kaj mirakloj, kiujn Dio faris inter la gojoj per ili. Post kiam ili silentis, Jakobo reagis: Fratoj, aŭskultu min. Simeon klarigis, kiel Dio komencis formi el la gojoj popolon por Sia nomo. Kaj al tio harmonias la vortoj de la profetoj, kiel estas skribite:

Post tio Mi revenos,

kaj Mi rekonstruos la disfalintan tendon de David,

kaj ĝiajn detruitaĵojn Mi restarigos,

kaj Mi referos ĝin,

por ke la postlasitoj de ĉi homoj serĉu la Sinjoron,

kaj ĉiuj gojoj, super kiuj Mia nomo estas proklamita,

Diras la Sinjoro, kiu depost jarcentoj ĉi tion diskonigas.


Tial mi do juĝas, ke al la gojoj, kiuj sin turnas al Dio, ni ne plu metu malhelpojn, sed ni ordonu al ili, ke ili sin detenu de malpuriĝo de idoloj, de malĉasteco, de sufokitaĵo kaj de sango. Ĉar jam de la pasintaj generacioj en ĉiu urbo Moseo, ĉiusabate legata en la sinagogoj, havas homojn, kiuj heroldas lin.

Agoj de apostoloj 15:1–21  
laŭ traduko de Gerrit Berveling

ili loĝis en Antioĥio, kaj kelkaj subenvenis al tiu ĉi kunveno de Judajo al Jerusalemo.

La esploristoj de Biblio atentigas pri tio, ke tiu ĉi parto estas ĝuste en la mezo de la libro de Agoj de la apostoloj. La Agoj enhavas 28 ĉapitrojn kaj post la 14a ĉapitro, do je la mezo estas tiu ĉi historio. Eblus ankaŭ en alia ordo rakonti la agojn de la apostoloj, sed certe estis pripensita redaktado, ke la skribanto metis tiun ĵus en la mezon de sia libro. Verŝajne li sentis, ke kio okazis dum tiu ĉi sinodo, tio estis decidigaj eventoj de la kristana historio.

Pli frue ni legis, ke Petro iris al Kornelio kaj baptis lin – jam ankaŭ tio kaŭzis grandan ŝokon kaj reziston, sed poste la apostoloj en Jerusalemo silentiĝis, trankviliĝis, kaj akceptis ke Petro iris al gojo, manĝis kune kun ili, kaj eĉ ili ricevis la benon de la Sankta Spirito. La



Petro kaj Paŭlo.  
El Greco ĉ.1595

bibliaj scienculoj tiel diras, ke tio estis la pionira laboro, ke kristanismo eliru el la judaj kadroj kaj libere iru ankaŭ al mondo de gojoj. Do tio estis iu prepara evento, sed la decida afero tie ĉi okazis, kiam la sinodo akceptis tion, pri kio oni antaŭe diskutis, ĉu Petro bone faris aŭ malbone faris. La skribanto de la Agoj raportas, ke kunvenis sinodo, la partoprenantoj preparolis la aferojn, ne per malgranda diskuto, ne per malgranda rezisto intertraktis la aferojn, kaj fine – ni legos tion pli poste – ili akordiĝis, ke ili sendos leterojn al la komunumoj kaj avertas ilin pri paco, ke ili ne kverelu unu kun la alia, kaj ĉiuj tenu kvar minimumaĵojn – kvar minimumajn petojn ĉiuj plenigu – kiel ni legas en la teksto. Fariĝis la decido, ke ne bezonas ĉiujn moseajn leĝojn teni, sed tiujn ĉi kvar regulojn ĉiuj tenu: ke ili sin detenu de malpuriĝo de idoloj, de malĉasteco, de sufokitaĵo (de tiuj bestoj en kiuj restis sango) kaj de la sango mem.

Tiun leteron ili forsendis kaj tiel finiĝis praktike la unua sinodo. Tio estas nia nuna temo kaj sur kelkajn pensojn mi metas apartan akcenton, ke ni profundiĝu en la mesaĝo de la versikloj.

La unua, kiun ni devas rimarki estas, ke en Antioĥio pace kunvivis komunumoj, aŭ pli precize la komunumo, ĉar tiu estis la plej granda, la dua patrina komunumo. La unua patrina komunumo estis en Jerusalemo, sed pro la persekutadoj ili devis fuĝi kaj kelkaj setlis en Antioĥio. Kaj tie eksplod-rapide kreskis la komunumo kaj fariĝis dua patrina komunumo. Kaj estas kompreneble, ke komenciĝis rivaleco inter la du komun-

umoj: kiu pravas? Ĉar en Jerusalemo ili restis fidelaj al la juda religio, regule ili iris al la templo ĝis kiam ne estis detruita, ili festis la sabaton kaj trovis memkompreneble, ke la gojoj, kiuj aliĝas al la komunumo devas cirkumcidi. Ĉar la unua generacio de la kristanoj konfesis, ke ili strikte apartenas al la judaro.

Ili opiniis, ke estas renoviĝa movado de judoj, ili konsideris ke estas vekigo en la judaismo, nova judaismo, kiu persvados la tutan judan popolon. Do ili sentis sin en forta unueco kun la judaro. Al tio apartenis la festado de la sabato, la cirkumcido, la koŝera manĝmaniero, ktp.

Sed en Antioĥio oni tute alimaniere pensadis. Tie gojoj estis kaj fariĝis kristanoj, kiuj tute neniam aŭdis pri Moseo, pri Torao, pri idoloj, pri templo. Ili el ekstero alvenis al kristanismo, al la komunumo, kaj neniu devigis ilin cirkumcidi aŭ festi sabaton.

Do komenciĝis rivaleco inter la du patrinaj komunumoj – kiu pravas? Ĉu la jerusalema komunumo pravas, kiu diras ke ni estas renoviĝa grupo de judoj, aŭ la antioĥia komunumo pravas, kiu diras ke ni estas tute nova societo. Ne estas hazardo, ke ni trovas en la Agoj, ke en Antioĥio oni nomis sin unuafoje “kristanoj”, kiuj sekvas Kriston, kredas en Kristo. Ĉar vere la antioĥia komunumo estis kiu disŝiris sin de la judaj tradicioj kaj leĝoj.

Estiĝis do streĉo kiun devis solvi. Proprasence estas mirakle, kiel longe tiriĝis la problemo, ĉar laŭ la kalkulado de bibliaj scienculoj tiu ĉi apostola sinodo estis en la jaro 48. Ĉirkaŭ en la jaro 30 oni krucimigis Jesuon Kriston, do post 18

jaroj okazis la sinodo – tiam la antioĥia komunumo jam dum dek jaroj funkciis. Dum dek jaroj vivis, elradiis de tiu ĉi komunumo la evangelio de Kristo. Praktike dum dek jaroj latentis la streĉo, kiu poste eksplodis al malfermita diskuto kaj nun ni estas la atestantoj pri kio okazas.

“nur”

La unua interesa afero estas, ke kelkaj diras, ke devas cirkumcidi, devas teni la judajn leĝojn – ĉar nur tiel eblas saviĝi. Se vi ne faras certajn ceremoniojn, ritojn, tiam vi ne ricevos savadon, ĉar nur tiu estos savita, kiu sekvas tiujn regulojn.

Ĉiam ege maltrankviligas min, kiam en religiaj rondoj oni diras la vorton: “nur”. Pri kio ajn oni diras “nur”, mi sentas, ke tie oni ne anoncas la liberecon de la evangelio de Jesuo Kristo.

En 48 oni diris, ke nur tiu saviĝas, kiu cirkumcidas. Nuntempe oni diras, ke nur tiu saviĝas, kiu ricevas Sanktan Spiriton. Nur tiu saviĝas, kiu konvertiĝas. Nur tiu saviĝas, kiu estas katoliko. Nur tiu saviĝas, kiu estas baptisto.

Mi ne povas diri, kiom multegaj “nur” eksonas en tiu ĉi mondo kaj mi protestas kontraŭ ĉiuj. Ne estas la vero, ne ekzistas en la afero de Kristo “nur”! Nur mi, nur ni scias bone.

Tipa ekzemplo, tipa afero estis, ke nur tiu saviĝas, kiu cirkumcidas. Praktike tiu frazo signifas, ke nur tiu saviĝas, kiu venas al ni kaj akceptas niajn regulojn.

Nur tiu saviĝas, kiu fariĝas baptisto kaj kiel plenkreskulo denove baptiĝas. Nur tiu saviĝas, kiu fariĝas adventisto kaj atendas la finon de la mondo. Nur tiu saviĝos, kiu... kaj longe eblus daŭrigi la ekzemplojn.

Ne estas la vero, miaj gefratoj! En la afero de Kristo ne ekzistas “nur”. Kaj precipe ne tiel, ke nur mi, nur ni. Dio gardu nin de tiu ĉi pensado! Kiu konas min, bone scias, ke neniam mi diris, ke nur mi pravas, nur nia komunumo pravas.

“Nur” en tio mi pravas, ke oni ne rajtas diri “nur”.

La unua generacio devis pridiskuti kaj kompreni tion, ke ne ekzistas “nur”.

Al kies konscienco estas grava, ke li apartenas al judaro kaj kiel juda kristano volas saviĝi, tiu cirkumcidu, festu la sabaton. Li rajtas fari tion, sed ne devigu la aliajn kristanojn kredi laŭ sia kredo. Ankaŭ hodiaŭ mi diras: tiu, kiu estas maltrankvila, ĉar en sia plenkreskula aĝo ne baptiĝas, iru kaj enakviĝu, tute ne ĝenas min. Sed ne diru, ke nur tiu saviĝos, kiu faros kiel li faras. En nia komunumo ni vivas en tia aero, en tia etoso kaj mi sentas ke tiu ĉi aero estas la libereco de Jesuo Kristo kaj mi ĝojus, se ĉie oni spertus tion. Pro tio estis la unua vorto, kiu frapis min en tiu ĉi legado la vorto “nur”.

# “sed”

La dua, pri kio mi pensadis estis, ke venas Paŭlo, Barnabas kaj la delegacio, kaj ili per granda entuziasmo rakontas,

kiel Dio benis ilian misian laboron. Antioĥio estas en la nuntempa teritorio de Sirio, norde de Jerusalemo, estas tie Fenikio kaj Samario, tra tiuj landoj ili venis al Jerusalemo. Ili rakontas, ke ankaŭ survoje ili ricevis tiom da benoj kaj ĝojoj – sed... Tie ĉi venas alia grava vorto: “sed”

Ekstaris kelkaj fiduloj el la farisea partio. Unue ni diru, ke estas ĝojiga afero, ke ankaŭ el la fariseoj konvertiĝis homoj, verŝajne ne malmultaj, kvankam la farisea grupo estis tre strikta grupo de tiutempa judaro. La evangelio havas tian potencon, ke ankaŭ el la grupo de fariseoj judoj konvertiĝis kaj akceptis Jesuon kiel ilia savanto – sed... Bedaŭrinde tie ĉi estas “sed”.

Ili konvertiĝis, akceptis la instruon de Jesuo, sed kiel bobelo suprenvenis en ili la malnova aĝo. Mi tiel malbele diras, ke ni akre komprenu la veron, ĉar ankaŭ hodiaŭ estas homoj, kiuj konvertiĝas, sed neatendite supren-bobelas en ili la estinteco kaj ili volas enkonporti, transsavi tiun pasintecon en la nunon.

Ekzistas tiu ĉi “sed” kaj ĝi estas tute homa trajto. Tiuj kompatindaj judoj dum sia tuta vivo kredis la instruojn de la fariseoj, poste ili konvertiĝis, ili akceptis Jesuon – sed...

La mesaĝo, la instruo en tiu ĉi “sed” estas al ni, ke ankaŭ en la vivo de ni ĉiuj povas okazi tiu “sed”. Kiam revenas la estinteco, kiam hantas la estinteco.

Nia kristanismo estas maldika tavolo, preskaŭ estas nur glazuro sur nia sinteno kaj sub tiu estas nia malnova homo, kaj neatendite trarompas la tavolon, la glazuron tiu “sed”.

Mi kiel pastoro, zorganto de homaj animoj, plurfoje renkontiĝis la fenomenon: dum pluraj jaroj iu fidele kredas en Dio, en Kristo, kaj tiam neatendite en trafika akcidento mortas lia infano. Tuj rompiĝas ĉio kaj venas la “sed”. Mi kredas en Dio, sed se povas okazi tio, mi flankenĵetas ĉion. Venis la “sed” kaj malkovriĝis, ke sub la kredo restis la malnova homo.

Mi avertas vin, ke vi ne ofendu tiujn kompetindajn fariseojn, ĉar ni ĉiuj estas samaj kiel ili.

Estu pli kaj pli dika la tavolo sur nia animo, estu ne-trarompebla. Tio estas bona, se estas tiel. Sed ne ĉiam estas tiel dika la kristana tavolo, kaj kiam venas sufero, maljusteco, korpa doloro, tiam venas la “sed” – kie estas Dio? Kial Li ne helpas?

Tion signifas la “sed”.

Mi parolas ankoraŭ iom ankaŭ el historia vidpunkto pri la evento, ĉar estas kurioza la situacio en Biblio, ke pri la sama okazaĵo, pri tiu ĉi jerusalema renkontiĝo ni havas du raportojn kaj ni povas kompari ilin.

Estis apostolo Paŭlo, kiu el Antioĥio iris al Jerusalemo kaj raportas mallonge pri la renkontiĝo en sia letero al la Galatoj, en la dua ĉapitro.

Kaj estis Luko, kiu skribis la Agojn kaj ni nun legis, kiel li skribis pri la sama okazaĵo.

Kompreneble estas gravaj aferoj, pri kiuj estas samaj la du raportoj, sed ankaŭ estas ne samaj aĵoj, kaj tiuj estas tre interesaj.

Nur la plej gravan diferencon mi diras nun: kiam apostolo Paŭlo en sia letero

raportas pri la sinodo, tute ne mencias la kvar minimumajn regulojn, pri kiuj ili decidis, ke minimume tiujn kvar regulojn ĉiuj kristanoj tenu. Li tute ne parolas pri ili, kaj ŝajnas ke Paŭlo ne sentis tion grave aŭ serioze. Ĉar ekzemple en sia letero al la Korintanoj li longe parolas pri la manĝado de la ofer-viando kaj li ne malpermesas tion, nur diras, ke se iun ĝenas, se vi manĝas ofer-viandon, tiam vi ne manĝu. Ne principe li malpermesas la manĝadon de la ofer-viando.

Eblas vidi, ke Paŭlo ne pensis, ke tiuj kvar reguloj estis gravaj kaj ne skribas pri ili en la Galata-letero, ke tiun decidon ili faris. Laŭ li la rezulto de la jerusalema sinodo estis iu disigo, ke Petro eble en la sinagogoj, inter la judaj kristanoj prediku Jesuon Kriston, kaj Paŭlo ja en la gojaj komunumoj prediku Jesuon Kriston.

Se mi rajtas tiel diri: ili geografie, religie disigis la sekvontan kristanan mision – estis unu ligilo, kiu ligis ilin, tiel diras Paŭlo: ke ni memoru pri la malriĉuloj. Kaj tiun taskon li vere plenigis.

Ni legis, ke la jerusalema komunumo pli kaj pli malriĉiĝis. La unuaj kristanoj entuziasme vendis siajn kampojn, aliajn havaĵojn, atendis la baldaŭe alvenontan Kriston. Kaj poste ili foruzis la ricevitan monon, kaj ili restis kaj sen mono kaj en la malamo de judoj. Estas aparta temo, mi nur mencias nun, ke en tiu ĉi tempo nekredible fortiĝis la juda nacionalismo. Pro la historiaj streĉoj la romianoj malamis judojn, sed ĵus en tiuj ĉi jaroj kreskis en judaro la amareco kaj venĝavido, kiu ankaŭ radiis al la kristanaj komunumoj kaj pli kaj pli malfaciligis anonci la evangelion.

Kaj kiel mi diris, la ligilo inter Petro (kiu laboris inter la judoj) kaj Paŭlo (kiu laboris inter la gojoj) estis la diakonio, ke la gojoj helpu la malriĉigintajn jerusalemajn gefratojn, kiuj estis persekutataj, kiuj vane volis labori, sed ne ricevis laboron. Kiel akriĝis la juda memkonscio, la streĉo inter la sinagogo kaj la kristanoj pli kaj pli fortiĝis.

Pro tio estas interesaj tiuj kvar reguloj, ĉar se ni detale vidas ilin, malkovriĝas, ke vere tio estas la minimumo, por ke juda homo manĝu aŭ vivu kun ne juda homo.

Al la judoj la sango estis teruraĵo, kaj mem la sango kaj tio, se en iu besto restis sango, tio estis neeltenebla al juda homo. La malĉasteco tie ĉi plejparte temas pri la miksitaj geedziĝoj, ke kredanta homo ne edziĝu kun nekredanta homo. Kaj kontraŭ la pluredzineco la kristanoj tiam komencis anonci la unuedzinecon. Kaj la plej grava proponita regulo estis la idolo.

Mia lasta penso, miaj gefratoj, estas ke kristanismo neniam vivis sen streĉoj. Ankaŭ hodiaŭ kristanismo ne vivas sen streĉoj kaj ankaŭ morgaŭ ni ne vivos sen streĉoj. Ĉiam estos diversaj vidmanieroj, dogmoj, konfesioj, kaj tio ne estas problemo. Tio signifas, devus signifi, la multkolorcon en kristanismo.

Vi pensu pri tio: se vivis inter ni gravulo, tiom da diversaj biografioj

aperas pri li, kiom da amikojn li havis, kiom da homoj havis kontakton kun li. Kaj ĉiuj verkistoj skribas sian propran bildon pri tiu ĉi gravulo. Kaj la vera homo estas ie inter aŭ malantaŭ aŭ super tiuj bildoj.

Ni imagu tiel ankaŭ kristanisman! Dio donis al ni Jesuon Kriston kaj homoj ĉirkaŭeniras Lin, ĉiuj vidas Lin kaj konfesas pri Li el siaj propraj direktoj, vidpunktoj, kaj ne estas problemo, kiam alimaniere parolas pri Li la ortodokso kiel la baptisto, la reformito kiel la katoliko. La problemo estas, se aperas la “nur”.

Bone, ke estas streĉoj inter kristanoj, ĉar malantaŭ la streĉoj troviĝas la part-pravecoj. Kiu diskutas kun alia, ili ambaŭ havas unu-unu part-verecojn, nur tiun ni devus fine ekkompreni, ke tio ne estas la absoluta praveco, la plena vereco, sed estas nur part-praveco. Se ni akceptus tion, tuj ni povus pli multe ami la katolikon, la baptiston, unu la alian, ĉiujn.

Dio benu nin, ke ni ekkomprenu, ke ne ekzistas “nur” – ekzistas multkolorco kaj en tiu multkolorco ni devas labori por la unueco. Kaj ni devas akcepti, ke ni jam havas tiun unuecon en Jesuo Kristo.



**kristanismo ne vivas sen streĉoj kaj  
ankaŭ morgaŭ ni ne vivos sen streĉoj**



# La tago de reformacio – prediko

Prediko dum Reta Diservo, 31 oktobro 2021  
<https://tinyurl.com/2taz2aeh>

Philippe COUSSON, FR

**K**araj gefratoj, okaze de tiu tago de la Reformacio, estas ĝojo denove alparoli vin.

Same estis ĝojo ĉi-somere revidi kelkajn inter vi, kaj mi esperas revidi pliajn venontan someron en Hungario.

Antaŭ pli ol kvin jarcentoj ekestis tiu moviĝo de la okcidenta Eklezio el kiu rezultis pluraj reformoj, kaj bedaŭrinde kun disiĝo de la kristana komunumo, la tri protestantaj reformoj, la luterana, la “reformita” kaj la radikala, kaj ankaŭ la du aliaj, la anglikana kaj la katolika en Trento. En la daŭro de la jarcentoj, ĉiuj evoluis, ĉu dise, ĉu maldise. Kvankam ĉiuj asertas la aŭtoritaton de la Bibliaj tekstoj, tio estas laŭ diversaj komprenoj kaj interpretoj. Rezulto estas multaj konfesioj.

Tiu fenomeno estas ampleksiĝinta en Usono. Pluraj gvidlibroj aperis por indiki, kiu Eklezio, kiu komunumo plej konvenas al vi. Ili atribuas kriteriojn por helpi al la elekto. Inter ili estas tiu de la aŭtoritato plej supera, inter tri punktoj : *Skriboj*, *Tradicio* kaj *sperto*. Ili indikas ordon de graveco de tiuj kriterioj por ĉiu konfesio.

Vi ĉiuj jam aŭdis pri la slogano de la protestanta Reformacio, nome *Sola gratia, sola fide, sola Scriptura, Solus Christus* kaj *Soli Deo gloria* : nur per graco, nur per fido, nur per la Skribo, nur tra Kristo kaj nur por la gloro de Dio.

Vorto, Parolo, Skribo, ĉu tiuj ĉi terminoj estas ekvivalentaj ? Parte jes, parte ne. Tie ankaŭ estas diskutoj. Kelkaj diras ke la Skriboj, nome la Biblio, estas la Parolo de Dio – laŭvorte. Aliaj diras ke ili entenas la Parolon de Dio tra la vortoj de la inspiritaj homaj aŭtoroj. Pliaj diras ke ili estas la atesto de homoj, de la spertoj de homoj kiuj rakontas siajn rilatojn al Dio. Ĉiuj almenaŭ parte pravas. Notendas ke la Biblia teksto estas tre varia. Simpla aserto pri ĝi ne validas.

La rilatoj inter la tri menciitaj aŭtoritatoj estas pli komplikaj ol oni povas supozi.

Ekzemple, kiu fiksas la kanonon, la liston de la retenitaj tekstoj, se ne la Tradicio, la Eklezio, sed ankaŭ la juda komunumo ? Inverse, la diraĵoj de la Eklezio, de ĉiu tradicio, estas ĉiam validigita per la Skriboj. Dank' al la Eklezio, la Skriboj alvenis ĝis ni, estis kopiita, tradukita, klarigita.

Kio validigas en mia vivo la Parolon, la Skribojn, se ne la persona spirita sperto, kiel diras Kalvino (Jean Calvin), la “interna atesto de la Sankta Spirito” ? Sed samtempe, la promesoj de la “Vorto de Dio” kuraĝigas nin, certigas nin, kiam la vivo senesperigas nin. Same kiam ni spertas la benon de Dio.

Apud tiuj, mi ankaŭ vidas aliaj eblajn fontojn de aŭtoritato, kiuj povas aspekti

pli nuntempaj, nome la racio kaj la naturo. Ĉu vi neniam aŭdis argumentojn kontraŭ la fido, kiuj sin apogas sur tiuj du ?

Sed, la fido estas plene racia, malgraŭ la asertoj. Per la racio oni povas legitime esplori la Bibliion, kompreni ĝin kaj ĝiajn kuntekstojn. Kaj la Bibliaj tekstoj povas kompletigi, relativigi kelkajn poziciojn supozatajn raciaj, kaj klarigi nian mondon.

La naturo, aŭ el alia vidpunkto la kreitaro, fakte atestas pri Dio, se oni saĝe kaj eĉ estetike rigardas ĝin. Kaj belaj tekstoj en la Biblio priskribas ĝin.

Kial do *Sola Scriptura* ? Kial Lutero diris antaŭ la dieto en Worms : *Pruvu al mi per la Skriboj* ?

Ni rigardu al tiuj versikloj el la dua epistolo de Timoteo (2 Tim 3:14–4:5). Kelkaj diras ke tiu teksto ne estas rekte de Paŭlo. Fakte, tio ne tre gravas. La Eklezio agnoskas ĝin kiel parto de tutaĵo kies logikon ni harmoniu.

La 16a versiklo de la 3a ĉapitro estas grava en la uzo kaj kompreno de la Biblio ene de sia kunteksto.

Notindaj tamen estas variaĵoj en la traduko. Nia Esperanta traduko de la Londona Biblia Komitato elektis la minoritatan tradukmanieron : *Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ ktp*. Sed la plejmulto tradukas jene (vi kontrolu en via lingvo) : *Ĉiu skribaĵo estas inspirita de Dio kaj ktp*.

En tiu tempo ne estis dubo ke la skribo, t.e. nia Malnova Testamento, la hebreaj tekstoj, estis inspirita de Dio. En la posta tempo, la Eklezio plivastigis la signifon ankaŭ al la Nova Testamento, al la tekstoj de la apostoloj. La plej ofta

traduko insistas pri la inspiriteco de la Sanktaj Skriboj kaj pri la konsekvenco, la utilo de ili. La malofta povus supozigi ke oni trovas inter la Skriboj kelkajn ne inspiritajn tekstojn, aŭ simple disigi la Skribon de la ceteraj tiutempaj “profanaj”.

La Skribo, do nun nia Biblio, estas do utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino, cele al perfekteco, al bona laboro.

Niaj Skriboj estis inspiritaj de Dio tra homaj aŭtoroj cele al la homoj, por instruo, admono, korekto, disciplino, perfekteco kaj agado.


La antaŭaj versikloj donas ankaŭ gravan indikon. Tiun tekston, tiujn vortojn ni ricevis. Aliaj transdonis ĝin al ni. La kredanta komunumo havas gravan rolon en ĝia plutransdono. Eĉ kiam konvertiĝo okazas per rekta agado de la Sankta Spirito, la alireblon al la teksto permesis la laboro de la kristanoj ie iam, gvidataj de la Spirito.

La finaj versikloj de tiu peco donas tiun respondecon al ĉiu atestanto pri Jesuo Kristo : *Prediku la Vorton, insistu ĝustatempe, malĝustatempe, konvinku, admonu, konsilu, en ĉia pacienco kaj instruado*.

La proklamo de la savo per Jesuo Kristo estas la tasko de la tuta Eklezio, kaj la vortoj, kiujn ŝi devas proklami devenas ĝuste de la Skribo.

La Skribo venas el Dio per la Spirito kaj kondukas, montras al Jesuo Kristo por la savo de la homaro, de la mondo.

Tiu, kiun konvinkis la Spirito pri ties peko, kiun la Spirito kondukis al konvertiĝo, estas vokita al nova vivo, al bona



laboro kaj al atesto pri tiu agado, en la lumo de la Biblio.

La meditado de tiu Skribo, ĝia pristudado, perfektigas en la praktika kompreno de la spirita vivo. Tia enprofundiĝo en la Skribo evitas la disvojiĝon, la jukantajn orelojn de la postaj versikloj.

Kiel diras la citita 105a versiklo de la 119a psalmo : *Via vorto estas lumilo por miaj piedoj, kaj lumo por mia vojo.*

Nenio kiu venas el Dio povas kontraŭdiri kion ni trovas en tiu Skribo kiam ni bone studas, meditas kaj ensorbas ĝin.

Ne la sola, sed la kerna, funda aŭtoritato de la fido estas la Sanktaj Skriboj. Ĝi staras sola en tio ke neniu alia aŭtoritato estas supera al ĝi, kvankam ĝi dialogas kun aliaj fontoj, aŭtoritatoj. Tiuj aliaj fontoj, aŭtoritatoj sub la lumo de la sankta teksto povas ankaŭ lumigi ĝin, sed per la Sankta Spirito ĝi ĉiam konservas la lastan vorton.

Ni do ne neglektu la voĉon de la persona sperto, de la eklezia tradicio, de la observo de la kreaĵo, de la pensado de la racio por pli bone aŭskulti al la Sanktaj

Skriboj. De Dio per la inspiro de la Sankta Spirito, ili celmontras al Kristo. Verkitaĵ de atestantaj homoj, ili estas adresitaĵ al ĉiu homo por savo kaj nova vivo.

En la evangelia perikopo de tiu Reformacia tago, oni trovas diskuton pri la kerno de la ordonoj de Dio, cele al la Regno de Dio, pri ĝusta meditado de la Skriboj, kaj la skribisto kaj Jesuo konsentas. Ne unuopa versiklo validas, sed la tuto havas signifon, resumeblan en la unu ordono duflanka (Marko 12:28-34).

Kompreni ĉi tion signifas proksimecon al la Regno de Dio.

Mi havas alian impreson, ke tiu skribisto ne nur pro sia kompreno alproksimiĝis al la Regno de Dio, sed ankaŭ ĉar li alproksimiĝis al Jesuo Kristo, kiu efektivigis tiun Regnon per sia vivo, morto kaj releviĝo.

Kiun ajn signifon vi donas al ĝi, mi volas lasi al vi fine ĉi tiun versiklon el la Evangelio laŭ Luko (Luko 21:33) : *La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos.*

Amen.

# Dank' al Dio

Koncizigita prediko de ĉeĥa pastoro Jiří Tengler

Esperantigis Pavel POLNICKÝ, ĈEĤIO

**D**ank' al Dio – milfoje ni diras tion sen konsidero, pripenso, sen senco. Eldirita sen atento je Dio. “Dank' al Dio” – vortkunligo, kiun oni uzas ĉe iu ajn bagatelaĵo kiel malplenan frazon. Tiaj bagatelaj moneroj de nia parolo. Nur enmiksiĝas kaj nenion vi povas gajni por ili. Moneretoj sen pensoj kaj sen sento.

“Dank' al Dio” – en plej bona okazo ia suspiro post superita danĝero. Ia necel-konscie pafita preĝo.

Al iu povas ŝajni malfacila danki – precipe al Dio. Kaj oni ne povas miri pri tio. Ĉu la ĉirkaŭa mondo ne instruas nin, ke mi mem kreas mian vivon? Ke mi mem respondas pri mia vivo. Vi havas vian vivon en propraj manoj, sonas proklamo de hodiaŭo. Delokita estas pruviginta kristana kanto, ke “Dio, la Sinjoro, havas en la manoj tutan mondon”.

Povas ŝajni al ni peza danki. Ni al kutimiĝis, ke je tio kaj tio mi havas pretendon. Tio devas esti je mia dispono. Mi pretendas materian sekurigon. Regularn enspezon, vendejojn plenajn de mangaĵoj kaj trinkaĵoj, varman akvon, tegmenton super kapo, honestan konduton de proksimuloj. Mi rajtas. Mi zorgas – kelkfoje obstine mi batalas – por miaj rajtoj: kontraŭ ŝtato, kontraŭ homoj – senprobleme eĉ kontraŭ Dio. Sed nun mi povas formeti miajn pretendojn. Mi povas formeti miajn senfinajn zorgojn,

kiu kion devas liveri kaj cedi. Mi povas halti kaj diri. Tiom multe mi jam ricevis. Mi povas, vi povas danki.

Mi ne kreis la mondon. Ke la mondo ankoraŭ ekzistas, ne estas mia merito. Neniu povas diri malon. Reale aspektas kiel Dia miraklo, ke malgraŭ frenezulaj homoj tiu ĉi planedo ĝis nun ne eksplodis, ke arboj ankoraŭ kreskas kaj bestoj – almenaŭ kelkaj – ĝis nun transvivas. Mi sentas en tio Dian kreadan forton kaj sentas lian volon. La volon konservi min kaj ĉi tiun mondon. Tiu ĉi planedo valoras vivi.



Dank'  
al Dio

Mi mem ne kreis min. Mi ne donis al mi vivon kaj ankaŭ mi ne estas tiu, kiu ĝis nun tenas min viva. Vere – tion mi ne kapablas, kvankam mi kun mia vivo faras multon. Mi sentas en tio Dian volon, mi distingas, ke tio estas Li, mia Dio, kiu volas vivon kaj ne morton.

Mi ne donis al mi miajn kapablecojn kaj ŝancojn. Kaj kiam mi pripensas, kion mi kun ili kaj el ili faris, mi opinias, ke

verŝajne ĉiu homo ricevas pli multe da ŝancoj kaj per sia talento povus fari multe pli, ol kiom estas eble dum unu vivo atingi. Denove mi vidas en tio plenplenajn donacojn de Dio, la Sinjoro, por sia kreitaĵo, donacojn ankaŭ por mi.

Lian amon mi ne meritis nek akiris. Tio plej grave. Ke Dio venis en Jesuo Kristo al ni, estas plene frukto de lia amo, lia boneco kaj korinklino. Mi ne kapblas min elaĉeti – eltiri min el tio, kio faras vivon tiel peza, kion al mi aliaj homoj riproĉas. Mi estas savita por la vivo pere de Dia grandanimeco.

“Dank’al Dio!” ne estas nur suspiro. Tio ne estas nur frazo. Nature tiuj vortoj povus esti esprimo de dankemo.

Ĉiujara solenaĵo de dankesprimo atentigas min, ke mi ŝuldas al Dio dankon. Ke al mi mankas dankemo, dankemo adekvata al tio, kion mi por mia vivo ricevas. Dankesprimo estas okazo eldiri al Kreinto nian dankemon kaj agnoski, ke nia dankemo ne havas iajn difinitajn limojn, ĉar ne eblas akurate elkalkuli, kion ĉion ni dumjare ricevis.

✞

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

**13. decembro**

*Ho Dio, riĉa en kompato, mi preĝas por la perditoj, por la vagantoj, por la rifugiĝintoj kie ajn, por tiuj, kiuj ne estas akceptataj. Pretigu multajn korojn por helpi ilin. Vi mem konduku ilin al Via patra koro.*

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



# For la batalilojn!

Recenzo de la libroj pri kaj de Bertha von Suttner

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

En la pasintaj tempoj mi legis du librojn, kiuj havis fortan efikon al mi kaj influis miajn pensojn longe.

Ambaŭ librojn eldonis Kava-Pech, la firmao de Petr Chrdle ([www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz))

**I**magu knabinon, kiu naskiĝis en 1843 en germana familio, en kiu kaj la patro kaj la onkloj estis generaloj de la imperiestra armeo.

La knabino kreskis lernante, ke la historio estas longa ĉeno de militaj okazintaĵoj kaj ne ekzistas pli bela morto ol la morto sur batalkampo de honoro. La junuloj plej bele aspektas en uniformo, kaj se ili mortas en milito la familio devas esti feliĉa kaj fiera, ĉar la plej bela morto estas, kiam oni mortas pro la patrujo. La junulino memnature akceptis, ke la virinoj havas la taskon esti belaj, trovi edzon, zorgi pri li kaj kompreneble naski multajn filojn, kiuj nepre estos soldatoj.

Ĉu vi povas imagi, kian longan vojon tiu ĉi knabino devis fari, ke ŝi fariĝu pacifisto kaj batalu por la monda paco kaj ĝenerala senarmigo?

Kiam jam ankaŭ tio estis skandalo, ke ŝi komencis legi la gazetojn? Kaj ŝi eĉ legis librojn kaj decidis eduki sin mem?!

Ĉu vi povas imagi la teruraĵon, ke ŝi en nobla societo memorigis alt-rangulon, kiel rapide ŝanĝiĝas en la gazetoj, ke iu lando estas la plej bona

amiko aŭ la plej granda kontraŭulo?

La libro de Bertha von Suttner – ankaŭ kun spertoj de ŝia propra vivo – estas verkita en vere bona stilo, kaj tiel bone kaptas la atenton, ke vi simple ne povas interrompi la legadon.

Ne estas hazardo la granda internacia sukceso de ĝi, eble inter aliaj kaŭzoj pro tio, ĉar estis la unua libro kiu krude kaj sen iu ajn romantika etoso rekte priskribis la teruraĵojn de milito.

Ankaŭ la esperanta traduko estas bone legebla. Unu nura bedaŭrinda afero, ke troviĝas tro multaj tajperaroj.



## Petr Chrdle: Sen laco por paco

**L**a eldonisto mem verkis libron pri la vivo de Bertha von Suttner. Tiu ĉi elstara virino, kiu estas la unua virino, kiu ricevis la Nobel-premion por paco, vere dum sia tuta vivo batalis por la monda paco, por la ĝenerala senarmiĝo, por la virina egaleco kaj kontraŭ la antisemitismo. La libro tre bone montras la du kontraŭajn emociojn pri ŝi: estis homoj, kiuj admiregis kaj apogis ŝian grandiozan laboron – kaj estis aliaj, kiuj mokis, eĉ ofte vere akre atakis ŝin.

La aŭtoro ne pentras rozkoloran, idealigitan bildon pri Bertha von Suttner. Li montras kaj ŝian talenton prelegi kaj ŝian mallertecon pri ekonomiaj aferoj, ni ekscias pri ŝia profunda amikeco ekzemple kun Nobel, kaj pri ŝia ne tro feliĉa familia vivo. Ni ricevas vere kompleksan bildon pri tiu tre interesa persono.

Jes, ni povus diri, ke Bertha von Suttner ne havis sukcesan vivon, ĉar ŝi ne

sukcesis atingi siajn celojn. Sed ni ankaŭ povas vidi, ke tamen ŝi influis homojn, iniciatis agadojn, plantis semojn, kiuj post ŝia morto, eble nur post jardekoj, tamen floriĝis – kaj nun estas nia tasko zorgi pri ili.

La nuntempa gejunularo, precipe en la okcidentaj landoj jam estas la triakvara generacio, kiu vivas en paco. Al ili la milito signifas nur filmojn aŭ komputilajn ludojn. Ĝus pro tio ili jam ne sentas la valoron de tiu trezoro, vivi en paco. Ni ĉiuj havas la respondecon, ke ni memoru kaj memorigu ilin pri la herooj, al kiuj ni devas danki, ke ili dediĉis siajn vivojn por nia paca vivo.

Bertha von Suttner kredis je pli bona mondo – same kiel ni esperantistoj kredas, ĉu ne?

Mi forte rekomendas al vi legi ambaŭ librojn!

☪



## **Ĝojplenan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron**

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras  
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNIČKÝ &  
Bengt Olof ARADSSON

# Parolado de Václav Havel\*

en Tutmonda Infana Kunveno, Novjorko, septembro 1990

Esperantigis: Oldřich Arnošt FISCHER, Ĉeĥio.

**S**injoro prezidanto, estimataj ĉeestantoj, dum lastaj dekjaroj mi en mia lando milfoje vidis vertebrarojn, kiuj estis subenfleksitaj ŝajne pro intereso de infanoj.

Milfoje mi aŭdis, ke iu sian flat-serveman servon al malamata reĝimo apologias argumentante, ke li (ŝi) tion faras nur por siaj infanoj, por ilin vivteni, por ili estu akceptitaj en studejojn, por ke ili povus vojaĝi al maro.

Milfoje diversaj konatuloj kaj nekonatuloj al mi konfidis, ke ili per siaj racioj kaj koroj plene apartenas al nia flanko – tio signifas al flanko de tiel nomataj disidentoj – kaj ili subskribas diversajn peticiojn, kiujn kontraŭ ni aranĝas totalisma registaro, nur kaj nur pro tio, ke ili havas infanojn kaj tial ili ne povas permesi al si lukson de obstino.

En nomo de la infanoj oni faradis malmoralon kaj por ŝajna bono de la infanoj oni servis al malbono.

Sed mi vidis ankaŭ pli grandajn perversaĵojn, malgraŭ ke nur en filmo aŭ televido: Hitler-on amike mansvingante al fanatigitaj knabinetoj el Junularo de Hitler; amas-murdiston Stalin-on kisante infanon kun junpionira koltuko, kies gepatroj finiĝis same kiel multe da aliaj en gulago; ĉeĥan stalin-an Gottwald-on ridete ŝercante kun ministraj metilernantoj, kreantoj de socialismo kaj venontaj handikapuloj; irakan prezidenton

Hussein-on, mankaresante infanojn de siaj garantiuloj, kiujn – kiel li nun diris – pafmortigontas.

Mi scias kaj travivis, kiel en Ĉeĥoslovakio en komunismaj koncentrejoj suferis miloj da homoj, el kiuj centoj estis ekzekutitaj kaj martirigitaj, kaj ĉio por mensogita feliĉo de ankoraŭ nenaskitaj generacioj en iu mensoge elpensita paradizo.

Kiel multe da malbono jam oni kulpis en la nomo de infanoj!

Sed mi travivis ankaŭ tute alispecan aferon, mi ĝin travivis eĉ antaŭ nelonge, antaŭ kelkaj monatoj, antaŭ unu jaro, antaŭ du jaroj.

Mi travivis belegan infanan ribelion kontraŭ la mensogo, al kiu servis iliaj gepatroj, onidire en intereso de la infanoj: nia kontraŭtotalisma revolucio estis – almenaŭ komence – infana revolucio.

En la stratojn eliris mezlernantoj kaj metilernantoj, tio signifas neadolta junularo.

Ili eliris en la stratojn kaj iliaj gepatroj timis. Ili timis pri ili kaj pri si mem.

Ili siajn infanojn ŝlosadis en siaj loĝejoj, en semajnfinoj siajn infanojn forveturigadis ekstere de grandaj urboj.

Poste ili komencis iradi en la stratojn kune kun siaj infanoj.

Unufoje kaŭze de timo pri ili, poste pro tio, ke ili estis venkitaj de ilia entuziasmo.



La infanoj en siaj gepatroj vekis iliajn plej bonajn memojn.

Ili siajn gepatrojn kulpopravis pri mensogo kaj devigis ilin starigi sin je la flanko de la vero.

Kaj infanoj de disidentoj?

Eĉ se oni al ili malpermesis studi kaj ili devis elteni malliberadon kaj persekutadon de siaj gepatroj, ili kontraŭ siaj gepatroj ne koleris, sed kontraŭe ili siajn gepatrojn estimis.

Ili pli multe interesiĝis pri morala ekzemplo de siaj gepatroj ol pri avantaĝoj, kiujn al ili garantius subenfleksita vertebraro.

En nia lando la infanoj mem kulpatestis ideologion de oferado de la vero al onidira prospero de infanoj pri ĝia malperfekteco.

Ili ekribelis kontraŭ siaj gepatroj, kiuj defendis tiun ĉi ideologion, kaj aliĝis al tiuj malmultaj, kiuj ekde komenco kredis, ke ili plej bone utilos al siaj infanoj, se ili ne elturnos sin pri siaj infanoj kaj ne mensogos, sed vivos je la vero kaj tielmaniere prezentos sin kiel la ekzemplo por siaj infanoj.

Internacia komunumo sukcesis fari eksterordinaran agon: dum kelkaj monatoj la plimulto da landoj de la mondo kapablis aliĝi al nekutime bona, preciza kaj enhavoriĉa konvencio por la protekto de infanoj.

Mi ĝojas same kiel ni ĉiuj pri tiu preskaŭ mirakla sukceso fierante, ke hodiaŭ matene mi havis honoron, nome de nia lando, tiun ĉi konvencion subskribi.

Sed samtempe mi opinias, ke tiu ĉi konvencio – same kiel iu ajn ebla internacia dokumento – ne povas la infanojn protekti kontraŭ ilia kvazaŭprotekto, tio signifas kontraŭ tio, ke iliaj gepatroj en ilia nomo kaj por ilia prospero – aŭ kredante pri siaj bonaj intencoj aŭ kaŭze de sia sintrompo aŭ per intenca mensogo – denove faru malbonon kaj tielmaniere al siaj infanoj nocu pli multe ol al si mem.

Same kiel ĉiu leĝo, ankaŭ tiu ĉi leĝo povas akiri siajn verajn sencon kaj signifon, nur se ĝi samtempe estos akompanata per morala memkonscio.

En la afero, pri kiu mi parolas, per morala memkonscio de la gepatroj.

Tion oni ne povas enigi en iun leĝon.

Sed se tio estus ebla, mi aldonus al la konvencio, kiun mi hodiaŭ subskribis, ankoraŭ unu paragrafon.

Tiu paragrafo enhavus la postulon, ke al gepatroj kaj ĝenerale al plenkreskuloj oni malpermesus en la nomo de infanoj kaj kvazaŭe por ilia prospero mensogi, servi al diktatoraj reĝimoj, denunci, servile flati, timi de diktatoroj kaj perfidi siajn amikojn kaj idealojn.

Kaj ke oni malpermesus al ĉiuj murdistoj kaj diktatoroj mankaresi infanajn hararojn.

Dankon pro via atentemo.

---

\* Václav Havel estis prezidento de Ĉeĥo-Slovaka Federacia Respubliko 1989–1992 kaj inter 1993–2003 la 1a prezidento de la Ĉeĥa Respubliko.

# Kristnaska arbo

El Vikipedio

**L**a tradicio de kristnaska arbo originas de antaŭ-kristana, ankaŭ “pagana” fekundeca simbolo. La daŭre verda abio reprezentas en tio la renoviĝon de la vivo.

La luterana teologo Oscar Cullmann sciigas, ke la kristnaska arbo ja ripetas la mitojn de antikvaj eŭropaj gentoj (kaj aziaj kaj amerindaj\* ktp), sed rekte ĝi daŭrigas la tradicion de la starigo de arboj antaŭ la katedraloj: tiuj arboj, ornamitaj per fruktoj, preskaŭ liturgie aludadis al la geneza arbo de l’ vivo. Dum tiuj cere-

monioj oni teatre enscenejigis la sanktas-kribajn eventojn.

La starigo de kristnaska arbo originas el Germanio, kie oni ornamis la domon en la mezepoko per arboj aŭ plantoj.

La unuaj notoj pri “kristnaska maj-arbo” aperis en 1494 en la verko *Narrenschiff* (Stultula ŝipo) de Sebastian Brant (1457–1521).

En 1535 oni vendis en Strasburgo malgrandajn taksusojn kaj ileksojn, kiujn oni starigis endome.

Oni ornamis la arbon en 1605 per



Franz Krüger: Antaŭvespero de Kristnasko – Patro kaj filo elektas kristnaskarbon



Johansen Viggo (1851-1935): Feliĉa Kristnasko

pomoj, en 1611 jam per kandeloj. La vera disvastiĝo en Germanio okazis en la 18a jarcento.

Goethe renkontas en 1770 (aŭ 1765) kristnaskan arbon kaj konatigis tiun kutimon en sia romano “La suferoj de la juna Werther” en 1774 en tuta Eŭropo kaj tiel popularigis ĝin. La kutimon germanaj enmigrintoj portis en Usonon, en dua duono de la 18a jarcento.

En Hungario unuafoje aperis kristnaska arbo nur en 1828 (aŭ 1825), en infanĝardeno de Teréz Brunszvik.

La kristnaskajn lampetojn inventis helpanto de Thomas Alva Edison, nome Edward Johnson en 1882; ilia seria produktado ekis en 1890.

Ekde 1947 en ĉiu jaro, Norvegio aŭ pli precize ties ĉefurbo Oslo, donace sendas kristnaskan arbon al Westminster (Anglio), esprimante per tio dankon por la helpo dum la dua mondmilito.

En Anglio estis disvastiĝanta la visko, la starigo de kristnaskarbo radikiĝis komence kiel germana kutimo.

La kristnaska arbo estas asociigita al la donacoj de Kristnasko. Ĉe la arbo oni ofte kantas aŭ aŭdigas kristnaskajn kantojn.



\* “amerinda” rilatas al la indiĝenaj triboj en Ameriko.



Rippl-Rónai József (1861–1927): Kristnasko 1910



Albert Chevallier Taylor: La kristnaskarbo (1911)



Reĝino Viktoria kaj sia familio festas Kristnaskon en 1848

# Mia eta filozofio

Prelego dum la kristana kongreso 2021 en Legnica

pastro Kazimierz Noculak, PL

**A**ntaŭ tri jaroj, dum la itala esperanto-kongreso en Triesto, mi travivis aventur(et)on, kiu inspiris min ekskribi ĉi tiun prelegeton.

Ĝi okazis en la antaŭlasta tago de la kongreso. Mi vagis en koridoroj de la kongresejo kaj mi serĉis la salonon en kiu okazos interesa prelego. Hazarde mi eniris salonon, kie daŭris eo-kurso por progresantoj, kiun gvidis la litova esperantistino Dalia Pileckiene. Mi tuj volis foriri sed Dalia invitis min: bonvolu resti. Mi klarigis ke mi eraris pri salonoj. Ne gravas ŝi diris, kaj mi restis. Kion mi ekvidis?

Dalia tenis en la manoj grandan bildon, kiu prezentis ridindan situacion sur kajo de stacidomo.

La tasko de kursantoj postulis priskribi precize la situacion prezentitan sur la bildo, por ke blinda homo facile ekonu la enhavon de la bildo.

Unu kuraĝa kursano el Belgio unua levis la manon kaj ekkomencis priskribi la bildon.

Parolante li uzis la vorton *vidi*. Dalia ekridetis kaj diris: Hubert, ĉu blindulo povas vidi? Hubert eksilentis. Ĉiuj eksilentis.

Tiam mi ekreagis: “Li pravas!” Mi ne sukcesis klarigi mian opinion, ĉar estis la lasta leciono. Mi revenis hejmen kaj mi tuj sendis leteron al Dalia en kiu mi klarigis mian “li pravas”-reagon, ke Hubert pravas.

Hubert pravas, ĉar oni povas uzi la vorton *vidi* dum la interparolo kun blindulo.

Dum mia vivo dum la estado en Vroclavo, antaŭ multe da jaroj, mi havis eblecojn interparoli kun blindulo. Mi eĉ ekkonis blindulon, kiu laboris en lernejo por blinduloj. Li estis instruisto.

Unu fojon, dum renkontiĝo, mi enmanigis al li etan donacon kaj mi diris: vidu kion mi alportis al vi. Mi uzis la vorton *vidu* kaj li tuj premis la donacon kaj per la fingroj palpis ĝin.

Atentu! Per fingroj! Tiuj anstataŭigas liajn okulojn, li ekkonis kion li ricevis!

Ĉi-momente liaj fingroj fariĝis liaj okuloj. Blindulo vidas per fingroj. Fingroj estas lia vido. Imagu – simila situacio estas kun surd-mutuloj.

Dum miaj teologiaj studoj mi partoprenis gestlingvan kurson kaj mi komencis kunlabori kun animzorganto por surd-mutuloj. Mi katekizis surd-mutajn infanojn. Dum la sanktaj mesoj mi predikis kompreneble per gestado.

Tiam mi rimarkis, ke ili estas mal-kontentaj kiam mi parolis, kiam mi uzis la vorton *surd-mutulo*. Mi faris la kutimajn gestojn, kaj tiuj ne plaĉis al ili. Ili diris: ni estas surdaj, sed ni parolas. La gestoj estas nia parolo. Jen ili pravas.

- Gestoj egalas parolo

- Fingroj egalas vido

Ĉu vi konsentas kun mia filozofieto? ☞

# Informoj



Kristana kongreso  
71-a kongreso de KELI

16-23 julio 2022  
Domaszék, Hungario

Serĉu “kristana kongreso 2022” en facebook.  
Iom post iom aldoniĝos pli da informo tie.

Aliĝilon al la kongreso vi trovas:

- sur tiu facebook-paĝo.
- en la antaŭa numero de Dia Regno, 5/2021.
- sur la paĝo <http://keli.chez.com>

## La 10a Internacia Reta Diservo en Esperanto

Vidu: [tinyurl.com/2taz2aeh](http://tinyurl.com/2taz2aeh)



10a Internacia Reta Diservo en Esperanto  
Reformacia Festotago 2021  
predikas Philippe Cousson el Francio  
pri 1 Timoteo 3,14-4,5

## Bibliaj Tagoj en la Romia urbo Trier

de 2022-03-16 ĝis 2022-03-20  
(merkredo - dimanĉo)

Aliĝilon al la Bibliaj Tagoj vi trovas:

- en la antaŭa numero de Dia Regno, 5/2021.
- sur la paĝo <http://keli.chez.com>

# Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno

per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto kaj la sekretario

## Kotizoj de KELI 2022

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI,	16,00 EUR
pagante tra libroservo	18,00 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni Dia Regno-n, turnu vin al la kasisto de KELI	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	2,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

### Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **UEA**, Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**  
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97  
Svedio 74374-0  
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:  
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:  
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;  
① +36 302 000 306; ✉ [agnes@raczkevy-eotvos.com](mailto:agnes@raczkevy-eotvos.com)

Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

### Landaj kotizoj:

**Britio:** 15 GBP  
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006  
"Fellowship of British Christian  
Esperantists (FBCE).

Kasisto: S-ino Jean Bisset, 47 Airbles  
Crescent, Motherwell, ML1 3AP;  
✉ [jean@bisset100.freeserve.co.uk](mailto:jean@bisset100.freeserve.co.uk)

**Bulgario** \*)

Peranto: S-ino Ivanka Kircheva  
Stoyanova  
P.O. Box 701, BG-9000 Varna  
☎ + 359 52 639628,  
✉ ivanka\_esperanto<ĉe>abv.bg

**Ĉeĥa Respubliko** 450 CZK

Peranto: Pavel Polnický,  
Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,  
☎ +420 723 672 335,  
✉ polnickypavel<ĉe>seznam.cz

**Estonio** \*)

Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,  
EE-10502 Tallin,  
✉ endel.ojasild<ĉe>gmail.com

**Finnlando** 20 EUR

Eblas aboni Dia Regnon uzante  
landan peranton de UEA aŭ laŭ la  
pagmanieroj menciitaj sur antaŭa  
paĝo.

**Francio** 25 EUR

CCP n-ro 10 456 15 U Paris,  
“Franca Evangelia Esperanto-Ligo  
(FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard,  
5 rue Maurice Ravel,  
FR-63800 Cournon d’Auvergne  
☎ +33 (0)4 73 84 31 31,  
✉ samuel.gaillard<ĉe>ac-  
clermont.fr

**Germanio** 25 EUR

Esperanto-Liga für Christen in  
Deutschland e.V.  
Banko: Evangelische Bank EG  
Kassel, Kiel  
IBAN: DE20 5206 0410 0006 4349 16  
BIC: GENODEF1EK1  
Kasisto: d-ro Rudolf Fischer,  
Gustav-Adolf-Str. 2a,  
D-48356 Nordwalde,  
☎ 0049 2573 / 626,  
✉ fischru<ĉe>uni-muenster.de

**Hungario** \*)

Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/  
B.II.8, HU 1201 Budapest  
☎ 01 283 6566

**Nederlando** 20 EUR

Vidu sub la pagmanieroj sur la  
antaŭa paĝo

**Pollando** 20 EUR

Vidu sub la pagmanieroj sur la  
antaŭa paĝo

**Rumanio** \*)

Peranto: Maria László, OF1.C.P.  
38 Exterior, 4800 Baia-Mare  
☎ 062 426182,  
✉ laszlo\_maria<ĉe>yahoo.com

**Slovaka Respubliko** \*)

Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko

**Svedio** 20 EUR

Pagu al la sveda UEA-konto  
(vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

**Svislando** 20 EUR

Pagu al la svislanda UEA-konto  
(vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

**Usono** 30 USD

Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton  
al la peranto: Jerald T. Veit, 3578  
S. Taylor, Milwaukee, WI 53207  
✉ jeraldveit<ĉe>yahoo.com

-----

\*) kotizo laŭ interkonsento  
kun la peranto

‡ Ŝanĝu <ĉe> al @

# Evangeli'

(originale verkita en Esperanto)

M (Soleado): WHEN A CHILD IS BORN



1. E - van - ge - li': Es - tas ĉi in - fan' —
2. Je - ru - sa - lem' ne ak - cep - tas Lin, —
3. Nun glor' al Di' en ĉi - e - la sfer' —



la Fil' de Di', sa - me hom - ar - an'. —  
sed Bet - Le - ĥem' pi - e kli - nas sin. —  
kaj pac' al ni ĉi - e sur la ter'; —



Li el Di - a bril' ve - nas kun hu - mil',  
Kaj kun o - li - ban' ve - nas el lon - tan'  
ĉar a - pe - ras Li, fil' de hom' kaj Di',



hom - i - gas sin por di - i - gi nin. —  
sa - ĝu - loj tri al la Fil' de Di'. —  
Krist', la pe - rant', fra - to kaj sa - vant'. —

EVANGELI' • M (Soleado): *Ciro Dammico* (= *Zacar*, \* 1947) kaj *Dario Baldan Bembo* (\* 1948) 1974, kelkajn jarojn pli poste uzita de *Fred Jay* (= *Friedrich Alex Jacobson*, 1914-1988) por: WHEN A CHILD IS BORN • ©  
Copyright control • E (originale verkita): *Albrecht Kronenberger* 2018-08-27